# SECCION OFICIAL

## ACTA XXIV

En Madrid, a 19 de junio de 1931, y como consecuencia de diversas entrevistas celebradas por los miembros del Comité Central de la Directiva de H. E. A., se resolvió proponer a los señores Vocales de la misma para Presidente provisional de nuestra Sociedad hasta la celebración del próximo Congreso Nacional de Esperanto, a D. Julio Mangada y Rosenorn, enviándoles la circular siguiente:

Madrid, a 20 de junio de 1931. Karega samideano: En la sesión plenaria del 27 de mayo de 1930, se acordó por unanimidad consultar oportunamente a los Vocales regionales para la elección de Presidente de nuestra Sociedad, y, en vista de las circunstancias en que se está desarrollando la vida nacional, el Comité Central de la Directiva de H. E. A. cree que ha llegado la oportunidad, y tiene el honor de proponer a usted para Presidente provisional, hasta la celebración del próximo Congreso Nacional de Esperanto, a D. Julio Mangada y Rosenorn.

El señor Mangada es sobradamente conocido de todos los esperantistas españoles; fué el fundador de nuestra Sociedad, y Vicepresidente de la Directiva provisional, presentando la dimisión de su cargo como un sacrificio glorioso en beneficio de H. E. A.; ha sido, y es, el primero y más firme defensor de nuestra actuación, y propulsor del desarrollo que hemos tenido; es Lingvokomitatano y Secretario fundador de nuestro Instituto Español de Esperanto; sus Revistas y sus libros acreditan su solvencia, y esperamos que con su habilidad y competencia logremos la consecución de nuestro ideal.

Ruego a usted que, a la mayor brevedad, se digne manifestar su parecer, porque en nuestra querida Patria estamos viviendo días de gran intensidad, y es de máxima conveniencia tener un Presidente que represente la Sociedad ante el Gobierno nacional.

Aprovecho esta ocasión para manifestar a usted el testimonio de mi más alta consideración y respeto.—El Secretario, *Mariano Mojado*.—V.° B.°: El Vicepresidente, *José Perogordo*.

Y no teniendo otros asuntos de que tratar, se dieron por terminadas nuestras entrevistas, acordando levantar la presente acta.—El Secretario, *Mariano Mojado*.—El Vicepresidente, *José Perogordo*.

---

## ACTA XXV

En Madrid, a 13 de octubre de 1931, en el domicilio social de la Sociedad Esperantista Española, Sagasta, 10, se reunió el

© Biblioteca Nacional de España

Comité Central de la Directiva, en sesión ordinaria, bajo la presidencia del Vicepresidente D. José Perogordo, y con asistencia de D. Julio Mangada y Rosenorn, y, después de un cambio de opiniones sobre la buena marcha de la Sociedad, en vista de que los Vocales de la Directiva habían aceptado la candidatura del señor Mangada para Presidente provisional de la Sociedad, hasta la celebración del próximo Congreso Nacional de Esperanto, sin tener ningún voto desfavorable, se procedió a hacerle entrega de la Presidencia con todos los honores y derechos que le corresponden, deseándole un acierto completo en la dirección de nuestra Sociedad y ofreciéndole nuestra modesta colaboración con entera fidelidad para conseguir el objeto de nuestro ideal esperantista.

Inmediatamente de tomar posesión, el Presidente se expresó en conceptos sobre la necesidad de una labor activa, proponiendo celebrar en el próximo mes de mayo, en Madrid, un Congreso Nacional de H. E. A., e invitar a los esperantistas hispanos que están fuera de nuestra organización a colaborar en él, para lo que se tratarán los siguientes extremos:

I. (Particular de H. E. A.).—Consolidar de una vez nuestra Asociación, poniendo a votación el Reglamento definitivo publicado en el órgano oficial de la Asociación y tratar cuantos asuntos hayan sido propuestos por los miembros de H. E. A. y concernientes a ésta dentro del plazo que se determine.

II. (General para todos los esperantistas hispanos).—Proponer la celebración del Congreso Universal de Esperanto para 1933 en Madrid.

III. (General para todos los esperantistas hispanos).—Celebrar una exposición de trabajos escolares de Escuelas de todos los países del mundo, por medio del Esperanto, con una sección especial de las escuelas en que se enseñe esta lengua auxiliar internacional.

IV. (También general para todos los esperantistas hispanos).—Tratar cuantas iniciativas en bien general del Esperanto fuesen presentadas dentro del plazo que se determine.

El Presidente hizo constar: Que el primer punto concierne única y exclusivamente a los miembros de H. E. A.; pero que éstos habrán de tener muy presente en sus proposiciones lo que es exclusivo de H. E. A. y aquello que afecte a asuntos comprendidos en el punto IV, sin que puedan dar lugar a reclamación en el caso de que, por no haberlo así tenido en cuenta, el Comité organizador juzgase que la proposición o proposiciones fuese o fuesen incorporadas al punto IV.

Que los puntos II, III y IV requieren la colaboración de todos

© Biblioteca Nacional de España

los esperantistas hispanos, sin distinción de grupo u organización a que pertenezcan; y que, por tanto, H. E. A. invitará a todos los samideanos españoles a una franca y noble colaboración al margen de todo partidismo, desarrollando el Congreso Nacional con arreglo a normas fijas que se determinarán para encauzar la labor, sin mermar para nada ni en nada la libertad de expresión de los participantes.

Que el Comité organizador se debe integrar con la parte Central de la Directiva de H. E. A., con los señores D. Vicente Alonso, D. Luis Rodríguez Escartín, D. Emilio Barrios y D. José Artigas, de Madrid, y con los Vocales Regionales de la Directiva, sin perjuicio de nombrar subdelegados locales.

Que la cuota de congresista sea UNICA y de CINCO PESETAS.

Que se pida inmediatamente el voto a los Vocales Regionales para proceder lo antes posible a la iniciación de los trabajos de organización. (1).

También expuso el señor Presidente los trabajos particulares hechos cerca del señor Ministro de Instrucción pública, los cuales reiterará oficialmente ya, como Presidente de H. E. A., en pro del Esperanto, y que prometen grandes frutos en el progreso de nuestra labor; y, finalmente, mostró un proyecto de reorganización esperantista universal, debido al señor Julio Baghy, que había hecho suyo la Sociedad Esperantista Húngara, que era la que lo remitía, pidiendo a la Directiva de H. E. A. su opinión y proposición complementaria; que, marcando el proyecto orientaciones idénticas a las que viene propugnando nuestra Asociación, debía ésta sumarse a la Sociedad Esperantista Húngara y publicar lo esencial del proyecto en nuestro órgano oficial, y que, no obstante la respuesta favorable de la Directiva, conforme a la petición que se le hacía para antes del 1.° de enero próximo, este asunto sea también comprendido en el punto IV.

El Comité Central de la Directiva aprobó unánimemente todos los conceptos expresados y someterlos a la aprobación de los Vocales regionales para el más rápido cumplimiento de todo el programa. Y, no habiendo más asuntos de que tratar, se levantó la sesión.—El Secretario, *Mariano Mojado*.—V.° B.°: El Presidente, *Julio Mangada*.

---

(1) Se ruega encarecidamente a los señores Vocales Regionales que tengan la bondad de contestar lo antes posible a los puntos que preceden y enviar su decisión a la Secretaría de H. E. A., Abascal, 13, principal A. Madrid.—El Secretario, *Mariano Mojado*.

© Biblioteca Nacional de España

# SECCION DE PROPAGANDA

## ANTAŬEN!

Sí; «¡Adelante!» debe ser el grito entusiasta de cuantos se sientan poseídos del ideal zamenhofano para marchar sobre el aún no fácil camino en que desarrollamos nuestra acción; pero nosotros entendemos que, para avanzar en ese camino, no es necesario *derribar* a aquellos esperantistas que entienden alcanzar la *finalidad objetiva* sin ajustarse a los *procedimientos subjetivos* de unos o de otros.

No es culpa de nuestra Asociación Española Esperantista lo que viene ocurriendo en el campo esperantista español, pues nuestra organización se dió en el Congreso de Madrid un Reglamento simple y eficiente, habiendo alcanzado el fruto apetecible, conocido de cuantos integran la Asociación; pero siempre con la enemiga de algunos elementos, que, en vez de separarse y organizarse a su gusto, prefirieron continuar en ella para *torpedearla*, no consiguiéndolo en el Congreso de Sevilla, donde no pasó de la intención y donde se trataron asuntos diversos y no el Reglamento, como se asegura por quienes no tienen en su *haber esperantista* una mínima parte de los éxitos que puede presentar en el suyo H. E. A. Pero, preparadas bien las cosas por los *torpedeadores* para el Congreso de Oviedo, de éste sale *torpedeada* H. E. A., *haciendo agua* que consigue *achicar* hasta reparar la avería; y cuando se da por *hundida* H. E. A., ésta continúa su ruta y avanza felizmente hacia su objetivo, sin preocuparse de los que la *quisieron y quieren hundir*, dejando a éstos en libertad absoluta de decir y hacer lo que estimen. ¿Quién es el culpable, pues, de que H. E. A. no haya progresado más? ¿Dónde está el fruto ópimo de aquellos que no han hecho más que procurar *hundir* la Asociación Española Esperantista? Si en vez de tender a destruir H. E. A., hubiesen dedicado sus afanes a organizarse independientemente y a trabajar por el triunfo del Esperanto, su labor sería muy digna de loa; pero querer crear destruyendo lo creado, no puede aplaudirse ni tolerarse por quienes no nos resignamos a dejar destruir lo que nos costó mucho crear sin el concurso de ellos, ya que solamente y desde el primer momento su colaboración fué *maquiavélica*. Marchen, pues, *adelante* por su camino y vayan en paz y de triunfo en triunfo, y dejen que H. E. A. marche lánguidamente, poco a poco, muy despacio, pero sin descanso y sin vacilación, segura de que así irá lejos. Y, si quieren, súmense los éxitos de H. E. A. y los trabajos de los *heaanos*, pues tienen derecho a hacerlo, porque lo que al Esperanto atañe es de todos; y porque de buena fe así

© Biblioteca Nacional de España

lo creemos, los invitamos a que compartan con H. E. A. en la labor a desarrollar en su próximo Congreso, que tendrá lugar en Madrid, hacia la mitad del mes de mayo de 1932.

*Basta de predicar, y a dar trigo*: dejemos si uno hizo o no hizo, que los esperantistas hispanos bien saben conocer a unos y a otros por sus obras; mas no basta esto, porque hay que continuar presentando obras, y no vamos a malgastar el tiempo en dimes y diretes, en si U. E. A. no progresó, y sí S. A. T.; en si tengo y he tenido más relación con los organismos esperantistas internacionales que tal o cual... ¡A trabajar, a trabajar! ¡Abandonemos la labor negativa con que se pretende dar un gran impulso al Esperanto y dediquemos las fuerzas todas de H. E. A. a la organización y celebración de nuestro próximo Congreso con miras al Congreso Universal de Esperanto para 1933, en Madrid también!

JULIO MANGADA ROSENORN
*Presidente provisional de H. E. A.*

* * *

## PRI REORGANIZO DE LA TUTMONDA ESP-MOVADO

Jus ni ricevis publikan leteron pri ĉi tiu afero de nia altŝatata samideano S-ro Julio Baghy, tre konata de la esperantistaro, fidinda zamenhofano, tutmondfama verkisto; ni ricevis la leteron laŭ formo de Memorando eldonita de la Hungarlanda Esperanto Societo, kiu sin decidis akcepti la planon de S-ro Julio Baghy al la reorganizo.

La letero konstatas ĉion, kion de antaŭlonge ni defendas, ĝi pravigas niajn konstantajn opiniojn; kaj tial ke la Hungarlanda Esp-Societo sendis la Memorandon al H. E. A. por trafi «opinion, kompletigan proponon de la estraro de ĉiu nacia societo», la estraro de H. E. A. decidis esprimi sian konsenton al la plano de S-ro Julio Baghy, kaj publikigi ĉefan parton el la Memorando por plena konscio de la *heaanoj* pri la plano aŭ projekto, kaj por ke ili konstatu, kiel la stagno de la hispana esp-movado vidiĝas tute klare en ĉiu alia nacia societo eĉ en la internaciaj organizaĵoj, kaj ne estas, ĉe ni, kaŭze de partikulara plano aŭ laboro nia, sed de ĝeneralaj cirkonstancoj; kaj se oni relegus ĉion publikigitan de ni pri la afero kaj tion komparus kun la projekto de Baghy, oni konstatus, ke ni ĉiam suriris la vojon realan al plej bona esp-laboro proponinte la plej efikan organizon de la esperanta popolo.

© Biblioteca Nacional de España

Kvankam centra parto de la estraro de H. E. A. akceptas la projekton de Baghy same, kiel ĝin akceptis la Hungarlanda Esp-Societo, ĉar antaŭ la 1-a de Januaro de 1932 ni devas respondi: tamen, la graveco kaj utileco de la projekto decidis nin ankaŭ pritrakti la aferon dum nia proksima Kongreso kaj peti de la Regionaj Delegitoj iliajn konsentojn por respondi al la Hungarlanda Esp-Societo antaŭ je tiu dato.

Jen fragmente la Memorando:

«La Esperantistaro nekontesteble estas nova popolo, kreita de kulturmovado de nia internaciisma epoko. En ĝia spirita sfero oni retrovas la plej noblajn aspirojn de la progresemo al la homa solidareco, en la vicoj de ĝiaj batalantoj oni povas distingi konsiderindajn talentojn, valorajn intelektulojn, entuziasman adeptaron por efektivigi serioze prilaboritan planon. La tuto de la Esperantistoj formas novan fonton de energio por la evoluo de la homaro. Malgraŭ tiuj ĉi facile konstateblaj faktoj la movado mem ne montras la deziratan progreson, nek la plimulto de la Esperantistaro konscias sufiĉe pri sia graveco en la moderna kulturkreado.

Verdire, la movado ne estas unueca. Ekzistas duspeca movado: *neŭtrala* kaj *laborista*. Tiu ĉi lasta baziĝas sur la klasbatala fundamento, adaptis kaj uzas la lingvon por siaj interesoj klasaj, ne multe okupas sin pri ĝeneralaj problemoj de tiu movado, el kiu antaŭ multaj jaroj ĝi elkreskis. La laborista esp. movado vivas sendepende, preparas sian propran vojon, havas proprajn krizojn kaj sukcesojn, plenumas sian devon en la disvastigo kaj evoluigo de la lingvo mem. La neŭtrala movado ne havas tian firman grundon sub si. En ĥaoso de ideoj vojserĉante ĝi palpadas kaj de jaroj klopodas trovi por si tian idean bazon, kies forto kuntenu, altiru la daŭran atenton de tiuj, kiuj havas diferencajn mondperceptojn kaj ne vidas ankoraŭ sufiĉe klare la avantaĝojn de internacia neŭtrala lingvo el vidpunkto de la ĝenerala progreso. Tian bazon trovi — neeble! *Tian bazon oni devas krei per persista kaj sistema laboro*. Sen firma idea bazo kaj sen gvidprincipoj la neŭtrala movado neniam povos fariĝi serioze konsiderinda por la neesperantistaj medioj. Nur forta celkonscia movado povas atribui al si sukcesojn kaj venkon. En tiu momento, kiam la neŭtrala movado havos siajn idean bazon kaj gvidprincipojn, ĝi akiros centoblan forton kaj ĉesos esti «*neŭtrala*». Ĝi fariĝos «*ĝenerala movado*», en kiu oni povos distingi specialajn klopodojn de fakorganizaĵoj, sed tamen ĝi ĥavos direktan forton interne kaj respektindan dignon ekstere.

La nuntempa «neŭtrala movado» degradas la popolon de la Esperantistaro je simpla amaso mirakloatenda. Jen la kaŭzo de la stagnado. La nuntempa gvidado de la movado malebligas la envortigon de

© Biblioteca Nacional de España

ideoj kaj burokratigas la movadon. (La Krakov-a Kongreso montris tion.) En la hodiaŭa movado iom post iom evidentiĝas la mankoj de la kontrakto, farita en Helsinki kaj la truoj de nia kongresa regularo. En la kunvenoj kaj direktado, iam demokratia, hodiaŭ oni povas vidi jam fenomenojn de diktatoremo. Jes, la disciplino estas absolute necesa, sed kia disciplino? ! Ĉu demokratia aŭ militarista? Ĉu parlamenta aŭ aŭtokratisma? La demokratia disciplino serĉas kaj pritaksas valorojn, konstruas kaj konvinkas per faktoj. La aŭtokratisma disciplino subpremas, detruas kaj venkas per perforto. La demokratia spirito edukas altnivelan liberalan popolon. La aŭtokratisma spirito ne toleras celkonscian popolon, nur obeeman amason, nekonsciantan pri propraj rajtoj kaj celoj. Ho, tute nemirinde, ke la esperantistaro fariĝis mirakloatenda amaso, kies energio dronas en la marĉon de la nenifaro, nutras sin per revoj de iamaj pioniroj kaj per la iluzioj de siaj gvidantoj. Ĉu mirinde, ke inter la narkotitaj bonvoluloj troviĝas kelkaj *malkontentuloj*? Ĉu ili estas efektive revoluciemaj konspirantoj aŭ nur simplaj vekiĝintoj, kiuj ĉirkaŭrigardante vidas; se la narkotado daŭras plilonge, ĝi povos estingi la vivomeĉon de la movado. Ne, ili ne estas revoluciuloj nur «*avertantoj*».

De longaj jaroj mi atentas la vortojn de tiuj *avertantoj* kaj poste mi konstatas la plenan indiferentecon pri iliaj vortoj. Ofte ŝajnas al mi, ke la kompetentaj instancoj absolute ne okupas sin pri la deziroj, sugestoj kaj laboroj de la «naiva amaso», hermetike ŝtopas siajn orelojn por ne aŭdi la vortojn de la «fanatikaj revemuloj». La kompetentaj instancoj diligente administras, registras kaj ĉiujare unufoje dum la kongreso ili oratoras pri interfratiĝo, raportas pri la «fideleco de la popolo» kaj fine venas lamento: «Ho, tiu malbenata ekonomia krizo!» Post la laŭtlego de la plej anemia oficiala raporto oni aplaŭdas kaj fine deziras «ĝisrevidon» en la proksima kongresurbo. Himno. Jen tiel aspektas ĉiujare nia kongreso.

Ne la pesimismo devigas min skribi tiel pri tio ĉi. Kontraŭe! Kun 100 %-a optimismo mi fidas en la propra forto de la Esperantistaro, mi estas konvinkita pri la graveco de nia movado, sed... *sed la disvolviĝon de la energio mi atendas de radikala reorganizado*. La *nura* administrado kondukos nin al pereo. La movado bezonas gvidantaron kun iniciatemo kaj kuraĝo por racie eluzi la propran forton de la Esperantistaro. La gvidantaro havu pretan programon por efektivigi ĝin, ĉar se nia afero tiel senprograme marŝos, baldaŭ eĉ la plej talenta administranto ne trovos ion por registri. Ni ne atendu plu miraklojn, sed ni mem faru ion en la intereso de la prospero.

* * *

© Biblioteca Nacional de España

Vole nevole oni devas konfesi, ke la antaŭmilita movado havis pli da morala forto kaj pli da celkonscio ol la nuna. Kompreneble, ĉar la postmilita taktiko elĵetis la idean bazon kiel superfluan, eĉ danĝeran balaston. Pro tio parto de la idealistoj perdis sian fidon kaj tiuj idealistoj, kiuj volonte aliĝus al tia kulturmovado, kia estas ankaŭ Esperanto, aŭdante, ke ĝi ne havas idean bazon, ne interesiĝas pri nia movado. Estas nekontestebla fakto, ke la idealistoj havas leonparton en la prospero de ĉiu movado. Anstataŭ la forĵetita idea bazo oni metis multe pli pezan balaston: *la praktikan valoron*. Venu, karaj praktikuloj, realistoj, nia movado atendas vin kun plenkorbo da praktikaj valoroj! En nia movado vi trovos ĉion deziratan! Nu, la malfeliĉaj praktikuloj pli kruele seniluziiĝis, vidante, ke tiu ĉi movado bezonas oferemon kaj tre malofte kontentigas la aspirojn de la profitemo. Antaŭ la milito neniam mi aŭdis tiajn lamentojn: «Kial mi restu esperantisto? Kion donas al mi la movado?» Kaj efektive, kion povas trovi la nuntempa esperantisto en la movado? Neglektitan, primokatan «internan ideon» kaj fiktivajn praktikajn valorojn. La movado fariĝis elizeo de belsonaj promesoj, en kiu silente revadas mirakloatenda amaso.»

... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ...

«Ĉu Internacia Centra Komitato estas bezonata por la movado? Jes! Absolute jes! Ni bezonas ĝin, sed ne en la hodiaŭa formo. I. C. K. estu efektive gvidanta centro, ĝiaj membroj havu definitivajn taskojn. Ĝi estu centra gvidantaro de demokratia popolo. Ĝiaj membroj estu elektataj de la delegitoj, oficiale senditaj al la kongreso. Ĝi havu programon, pri kies plenumado ĝi respondu. Jes, I. C. K. estas nepre konservinda, ne kiel diktatora, sed kiel plenuma komitato.

*La kongresoj*. Ili jam ne havas plu la saman efikon kaj signifon en la movado, kian ili havis iam. Ilia rezulto ne estas produktiva. Kompreneble, ĉar la kongreso ne havas decidkapablon, nur proponrajton kaj ĝi ĉefe servas por la amuzemo de la partoprenantoj. La plimulton de la kongresanoj ne interesas la oficialaj kunsidoj. (Plejparte pro tio, ĉar ili ne okupas sin pri la internaj aferoj.) La solena malfermo plene kontentigas ilin. Post niaj kongresoj ofte okazas, ke la loka movado inertiĝas aŭ tute ĉesas ekzisti por longa tempo. Ni ne bezonas tiajn kongresojn. Jam alvenis la tempo por enkonduko de la *parlamentaj* kongresoj kun rajtigitaj deputitoj kaj kun registaro respondeca. En tiuj laboraj kongresoj oni forigu la salutparoladojn de la naciaj societoj kaj per tio oni forigos la ĉiam ripetiĝantajn malagrablajn protestojn de la naciaj minoritatoj. Rajton por salutparolado havu nur la *ŝtataj* reprezentantoj, kiuj staras ekster la movado. En tia kongreso kunvenas ne reprezentantoj de naciaj societoj, sed *nur*

© Biblioteca Nacional de España

esperantistoj, kiuj komune devas havi solan taskon: sukcesplene solvi la problemojn de la movado, trovi ĉiam la ĝustan formon por la harmonia kaj unueca laboro. Tiaj kongresoj certe krestigos la memestimon de la esperantistaro kaj vekas ne efemeran interesiĝon en la publiko ekstermovada.

*La naciaj societoj.* Bedaŭrinde, ke post la milito ili plejparte baraktas sen financa bazo kaj batalas preskaŭ senrezulte kontraŭ malfavoraj cirkonstancoj kaj rigoraj oficialaj instancoj. Ilia propagando, preskaŭ ĝenerale, estas malmoderna, tro afiŝa kaj pro tio la rezulto tre fiktiva, ofte absolute negativa. La persona varbado, lerta persvado ankoraŭ nun havas la plej fruktodonan efikon, sed la varbito malofte trovas la realiĝon de la belaj promesoj. Multaj seriozuloj el la novaj varbitoj motivas sian foreston: «*La movado okupas sin pri bagatelaĵoj kaj la kluba vivo de la esperantistoj respegulas entuziasman senprogramecon. Oscedali oni povas pli senĝene hejme*». Konfesinde estas, ke la movado, rigardate de ekstere, ŝajnas esti multe pli serioza, grandioza ol ĝi estas, kiam oni rigardas ĝin interne. Pro tio ni devas fari duspecan propagandon: *eksteran* kaj *internan*. Tiam ne povos okazi, ke la eksteran propagandon kompromitas la interna nenifaro. Oni devas iom post iom inokuli en ĉium Esperantiston, ke li estas *ne sole uzanto de ia artefarita lingvo,* sed ĉefe li estas *konscia batalanto de la progreso.* Tiam ni atingos tiagradan internan plifortiĝon, kiu povas formi la fundamenton de vivkapabla estonteco.

*La Akademio, Lingva Komitato.* Malgraŭ la riproĉoj, multflanke esprimitaj, mi asertas, ke ilia laboro estis kontentiga. Oni ne atendu anarĥiaĵojn de organizaĵo, kies devo estas gardi la *sanan evoluon* de la lingvo. La Akademio havas la taskon kontroli kaj registri, sed neniel krei la lingvon. La lingvo kreiĝas per la uzantoj. Tamen en la estonteco oni povas doni novajn taskojn al la Akademio kaj al la Lingva Komitato. Tiuj novaj taskoj servu por la plialtigo de ilia aŭtoritato. Pli sube mi revenos al tiu ĉi punkto.

*La ĝenerala ekonomia krizo.* Jen la plej ofte menciita kaŭzo de la nuntempa stagnado. Efektive ĝi estas unu el la kaŭzoj, sed *ne la sola* kaj *ne la ĉefa.* Cetere, ĉu ni faris ĉion eblan por mildigi tiun krizon en nia movado? Se io okazis en la intereso de la mildigo, tio estis la minimumo. Kial ni ne riskis la maksimumon? Simple pro tio, ĉar *nur* tiu gvidantaro rajtas postuli pli, kiu havas efektivigotan programon kaj konstante estas en kontakto kun la tuta Esperantistaro. Sole U. E. A. povas fieri pri la oferemo de kelkaj siaj membroj, sed U. E. A. ĉiam klopodas doni ankaŭ rekompencon. Tamen objektive pensante, ni devas konfesi, ke U. E. A. *ne estas la tuta movado,* nur *unu grava organizaĵo.* Multaj pensas la malon. Bedaŭrinde, el certa vidpunkto ili estas

© Biblioteca Nacional de España

pravaj. *Do, la malbenatan krizon oni devas venki, ĉar la reorganizado kaj la laŭprograma gvidado postulas batalkapitalon. Ni nepre devas krei* kaj mi asertas, ke *ni povas krei tiun financan bazon*, kiu estas bezonata por plena disvolviĝo de tiuj kaŝitaj fortoj, talentoj, kiuj fine faros nian movadon neforigebla kaj absolute necesa kulturfaktoro de la estonta socia vivo.»

... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ...

«La Esperantistaro nekontesteble estas popolo, kies prospero dependas de tio, *kiamaniere* kaj *kiagrade estas uzataj ĝiaj propraj fortoj*. La Esperantistaro havas ĉion necesan por memstare direkti sian sorton. Nun sole la neorganiziteco, pli ĝuste esprimite la elmodiĝinta konstitucio malhelpas ĝian evoluon. La Esperantistaro estas popolo, kies teritorion formas la tuta mondo kaj kies nobla aspiro estas: *fariĝi necesa vivelemento en la socia vivo de la homaro*. La Esperantistaro ne havas imperialistajn revojn, sed *ĝi volas fariĝi respektata servanto de la internaciaj interesoj*. La Esperantistaro estas popolo, kiu kun lojala respekto al la naciaj kulturhumoj *neniam povos forgesi pri tio, ke la nutrosukon ĝi ricevas el ili por produkti kaj redoni novajn valorojn al la grandaj komunumoj, vivantajn en naciaj unuecoj*.

Esperanto ne estas plu lingva problemo, sed socia demando, sekve la sorto de la Esperantistaro dependas de tio, kiamaniere ĝi povos trovi sian lokon en la socia evoluo. Esperanto, la lingvo, jam plurfoje pruvis liberiĝon el tiu ĥaoso de ideoj, kiu karakterizas la postmilitan tempon. Ĝuste tiu ĉi vojserĉado, sopiro al memstara kulturvivo, la batalema kritiko, la kunpuŝiĝoj de la diversaj opinioj montras, ke la Esperantistaro disponas pri la necesaj volo kaj energio por liberiĝi el la sklaveco de la ĥaoso, por alporti tiun miraklon, kiun la revemuloj vane atendas de eksteraj milionuloj. La movado ne tuŝas naciajn interesojn kaj kiel necesa kulkurfaktoro ĝi vekos simpation, se *ĝia diplomatio* sukcesos direkti la atenton de la mondo al ĝi. Tiu diplomatio devos konvinke pruvi al la skeptikuloj kaj al la ŝovinistaj malamikoj, ke la apero de Esperanto estis nepre necesa bezonaĵo por la moderna internacia vivo de la nacioj, ke ĝi signifas gravan paŝon antaŭen sur la vojo de la progreso, ke ĝi servas *por la defendo de la lingvo kaj kulturo de la malgrandaj nacioj* kaj ke ĝia venko firmigos kiel necesa mortero la fundamenton de la Paco. Sed tian diplomation povas eduki nur tiu movado, kies bazo konstruiĝis sur firmaj gvidprincipoj kaj kiu povas kalkuli pri popolo, kies kvalito garantias la konsiderindan forton por la kvanto.

La Esperantistaro ne povas prosperi sen idea bazo. Estas necese determini la sencon de tiu forto, kiu kreas solidarecon inter ni kaj

© Biblioteca Nacional de España

samtempe faras la Esperantistaron vivelemento de la internaciaj interesoj. Hodiaŭ oni vivas en la periodo de preparoj milita kaj paca. La militpreparoj plenigas la animojn je timo, teruro kaj malamo. La pacpreparoj celas malarmadon. Ne povas esti demando, al kiu partio apartenas la Esperantistaro. La pionira periodo deklaris interfratiĝon, dum la milito nia movado mildigis la suferojn de tiuj, kiujn la ondegoj ĵetis al malamikaj rifoj. Nun, post la kataklismo, nia celo ne povas esti io alia ol *la malarmado de la animoj, venenitaj de la milita ideologio*. Per tio mi ne volas sugesti, ke nia movado katenu sin al iu ajn nuanco de la pacifista movado. Tute ne! Tio prokrastigus pli malpli la liberan evoluon. Pli realan kaj pli elastan bazon ni bezonas. La celo de la Esperantistaro jam delonge estas: *krei tian kulturon, en kiu ĉiu popolo retrovas sian egalrajtecon* kaj *per tiu nova kulturo akceli la reciprokan estimon inter la nacioj*. Nian agadmanieron karakterizu: *konservativismo en la gardado de la ekzistantaj naciaj valoroj* kaj *liberalisma progresemo al la celoj de la homa solidareco*. En tiaj celo kaj agadmaniero oni facile retrovas tiun idean bazon, kiun povas akcepti ĉiu kulturhomo, kies animo bezonas plian enhavon por kontentigi lian laboremon.

La Esperantistaron karakterizas la demokratiaj principoj kaj tial ĝi rajtas decidi pri sia sorto, havas sufiĉe da forto por direkti siajn paŝojn, efektivigi programon, racie faritan kaj akceptitan de la plimulto. *Tial la tuta reorganizo devas respeguli tiun demokratian karakteron*. Kompreneble *ne ĉio* estas efektivigebla en la *unua* momento, sed ĉio estas atingebla per celpersista laboro.

I. C. K. estu vere centra registaro kun *pli da rajtoj kaj pli da respondeco* ol ĝi havas nun. Ĉiajn membrojn elektu la membroj de la parlamenta kongreso por tri jaroj. La membroj de I. C. K. havas certan honorarion por siaj respondecaj laboroj. La laboro dividiĝas laŭfake inter la 5 funkciuloj: 1 prezidanto, kaj 4 gvidantoj por la fakoj: organiza, propaganda, kleriga kaj financa. Krome I. C. K. havas centran oficejon kun pagataj oficistoj por administraj laboroj. Ĉiu fakestro havas siajn referantojn en la naciaj societoj. Tiuj ĉi personoj estas la reprezentantoj de I. C. K. en ĉiu lando. Ilia devo estas gvidi la aferojn laŭ intenco de la Centro, klarigi kaj popularigi la programon de la gvidantaro kaj fari raporton de tempo al tempo por la centraj fakestroj. Tiamaniere I. C. K. havos siajn proprajn personojn kaj povos respondece prepari kaj plenumi la programon, akceptitan de la parlamenta kongreso: gvidi pli racie la movadon kaj interkonsiliĝi kun siaj kunlaborantoj. I. C. K. havas la devon prepari la raportaron por la parlamenta kongreso, kiun ĝi kunvokas kaj aranĝas en *ĉiu tria jaro*. En tiu kongreso la fakestroj raportas pri la

© Biblioteca Nacional de España

finita laboro, pri la programo por la postaj jaroj kaj petas rajtigon por transpreno de sumo por siaj buĝetoj. Kiel ajn primitiva estu en komenco tiu ĉi organizo, ĝi montros bonegan rezulton post la unuaj jaroj, ĉar tia agado donos altan signifon al I. C. K. kaj al ĝia parlamenta kongreso.

*La parlamenta kongreso.* Okazas en ĉiu tria jaro. Ĉeestanto de la parlamenta kongreso povas esti ĉiu esperantisto, sed *parol-* kaj *voĉdonrajtojn* havas nur la rajtigitaj deputitoj de la Esperantistaro. Tiujn deputitojn elektas la esperantistoj por *tri* jaroj. La parlamenta kongreso havas ne nur proponrajton, sed definitivan decidrajton per sekreta balotado. La membroj de la parlamenta kongreso elektas, absolvas aŭ reelektas la membrojn de I. C. K. Ĉiu deputito havas la rajton postuli de la Centra Kaso la vojaĝelspezojn kaj minimuman tagan honorarion por la kongrestagoj. Ĉiu deputito havas la devon raporti pri la kongreso al siaj elektintoj kaj dum la daŭro de sia mandato havi kontakton kun ĉiuj referantoj de I. C. K. en sia landa societo. Tiamaniere ni atingos, ke nur serioze konsiderindaj personoj povos alparoli la temojn en la parlamenta kongreso kaj iom post iom ni havos bone disciplinitan deputitaron, kiu ĝisfunde konos la problemojn de la movado kaj klopodos ilin solvi post sufiĉa studado. Tio plifaciligos la laboron de I. C. K. Certe ekzistos serioza opozicia partio, sed *ĝi estas necesa* ĉe tia konstrua laboro *por kontroli, stimuli, eble sugesti novajn ideojn* por la pliperfektigo de la programo kaj al ĝia plenumado.

*Kiu povas elekti la deputiton por la kongreso?* Ĉiu esperantisto, sendepende de tio, ĉu li estas membro aŭ ne membro de la nacia societo, se li havas la balotlegitimilon de I. C. K. La balotlegitimilo estas numerigita kvitanco pri sumo *sv. fr. 0,50*, pagita al la centra kaso kiel ĉiujara kulturimposto de la movado. Ĉiu esperantisto kaj nova varbito *devas pagi* tiun sumeton en ĉiu jaro por la centra kaso kaj por tio li ricevas la legitimilon, kiu rajtigas la posedanton voĉdoni ĉe la elektado de la deputitoj. Ridinde malalta sumo, sed se ni rigardas la statistikon pri la nombro de la esperantistoj (150.000) ni povas facile imagi la proksimuman sumon, kiun rezultas tia kulturimposto. Ni supozu, ke 100 mil esperantistoj plenumas *tiun ĉi unuan* kaj *plej ĉefan devon*. Tio signifas jam en la unua jaro 50.000 sv. frankojn. Tre konsiderinda kapitalo por atingi sukcesojn en la movado. Se komence nur la duono de tiu ĉi sumo kolektiĝus jam signifus multon por la ĝenerala movado. Sed ni ne forgesu, ke tiu kulturimposto estus enkasigata konstante de la novaj varbitoj. Tiu ĉi kapitalo formus la financan bazon de la ĝenerala movado. Esperantisto, kiu ne havas sian validan balotlegitimilon, ne havas rajton voĉdoni por la deputito.

© Biblioteca Nacional de España

Ĉiu nacia, faka, internacia societo aŭ organizaĵo devas havi provizon da balotlegitimiloj por ne preterlasi eĉ unu okazon, kiam ili povas averti pri la plenumo de la unua devo ĉiun esperantiston, ankoraŭ ne pagintan sian kulturimposton por la movado.

*El tiu ĉi centra kaso la parlamenta kongreso asignas por la buĝeto de I. C. K.*

*La naciaj societoj*, pli bone informitaj pri la intencoj kaj programo de I. C. K., certe havos pli viglan vivon kaj laŭbezone ili povas peti helpon de la Centro. Tiamaniere la gvidado *parte* fariĝas unueca, sed tamen restas la aŭtonomio en la landa propagando, lokaj aranĝoj ktp. La parlamenta deputito kaj la referantoj de I. C. K. kvaronjare informas la lokan esperantistaron pri la stato de la movado, kaj helpas en la efektivigado de la programo, akceptita de la kongreso.

*La Akademio kaj Lingva Komitato* havu la taskon fondi ekzamenajn komisionojn en ĉiu lando por la *unua-* kaj *duagradaj ekzamenoj* kun samaj regularo kaj ekzamenplano kaj ĉiujare unufoje en la kongresurbo ili starigu komisionon por la triagrada (profesora) ekzameno. *Ĉiu diplomo estu eldonita de la E. Akademio kaj Lingva Komitato*, sed la diplomojn por la unua kaj duagrada ekzamenoj subskribas mem tiu L. K-ano, kiun la Akademio komisiis por tio. Malgranda procento de la ekzamenkotizo iras en la kason de la Akademio por helpi ĝian laboron, la alia parto apartenas al la aranĝanta societo. La diplomojn, donitajn dum la kongresa ekzameno subskribas la ĉeestantaj akademianoj kaj la prezidanto de la Akademio. 10% el la ekzamenkotizo iras al la centra kaso de la movado, la alia parto apartenas al la kaso de la Akademio.

La Internacian Ĉe- Instituton de Esperanto oni vivigu al la oficialaj organizaĵoj kaj zorgu pri tio, ke ĝian elementan kurson sekvu kursoj por progresantoj kaj por supera diplomo. Ankaŭ tiu ĉi instituto havu provizon da balotlegitimiloj por siaj kursanoj.

Mi propinas starigi en ĉiu esp. grupo ŝparksan urneton kun la surskribo: «*Obolo de Zamenhof por la Kulturfondo*». En tiun urneton ĵetu ĉiumonate almenaŭ unufoje ĉiu esperantisto sian memvolan donacon. Ni ne fiksu la altecon de la sumo. Ĉiu donacu tiom, kiom li volas aŭ almenaŭ tiom, kiom li kutime donas al iu ajn almozulo... Tiu ĉi ĉiumonata libervola donaco alportos novan energifonton por nia movado. La urneto staru ĉiam sur la tablo de la kunvenejo, ĝi rondiru dum niaj festoj, baloj, literaturaj vesperoj! La enhavo de la urnetoj estu kolektitaj laŭlande en unu sumo kaj estu sendita al la Centra Kaso de la Movado por la Kleriga Fako. Tiu ĉi kulturfondo kreu kaj konstante subtenu tiun novan instituton, kie en Zamenhof-a

© Biblioteca Nacional de España

spirito estu edukitaj por la movado tiuj junaj talentoj, kiuj dediĉis sin por nia afero. Mi aludas pri *Esperanta Universitato*, kies diversaj fakoj science kaj el altaj vidpunktoj de la socia vivo pritraktas, instruas, edukas por ni celkonsciajn, eminente klerajn gvidantojn. Ĝiaj profesoroj estu eminentaj universitataj profesoroj diverslandaj, kiuj profunde okupiĝis pri siaj fakoj el vidpunkto de la esperanta movado. Studento de la Esperanta Universitato povas esti ĉiu esperantisto, kiu akiris por si la triagradan diplomon de la Esperanta Akademio. La universitata studado daŭras 1—2 jarojn. Mem la Esperanta Universitato estu sub la protektado de tiu lando aŭ urbo, kiu donacis por ĝi senpagan terenon kaj morale subtenas ĝin.

*Kia sumo povus rezulti en ĉiu jaro el la «Obolo de Zamenhof por la Kulturfondo»?* Supozable ekzistas 20.000 esperantistoj sur la tero, kiuj konstante aŭ almenaŭ ofte vizitas la klubajn, grupojn, societojn, festojn de la movado. Nu, se ĉiu monate donacas en unu sumo aŭ en plurfoja sumo nur sv. fr. 0.10, tio signifos en kolektita sumo ĉe la fino de la jaro sv. fr. 22.000. Post tri jaroj ni jam havus konsiderindan kapitalon por lui domon, por honorarii la profesorojn de nia Universitato.

*La propagando* estu *ekstera* kaj *interna*. La unua zorgas pri la varbado de novaj adeptoj, klopodas veki interesiĝon pri nia movado en la diversaj medioj de la socio, preparas la vojon por enketo de ŝtataj reprezentantoj pri la internacia lingvo. (Detale prilaboritan projekton pri tiu ĉi propono donos D-ro Jan Mądrkiewicz, Lublin). La interna propagando, *precipe en la unuaj jaroj*, havas specialan gravecon. Unu el ĝiaj plej ĉefaj taskoj estas la plifortigo de la moralaj fortoj en la movado. En la sukcesintereso de tiu ĉi propagando ni devas disponigi ĉiun ekzistantan energion al la interna solidiĝo por atingi tian altniveliĝon, kiu kreos kaj konservos tiujn utilojn, pri kiuj hodiaŭ parolas nur la propagandistaj promesoj. Per konstanta edukado, oficiala subteno de niaj institucioj, celantaj *la altigon de la kvalito*, per enkonduko de novaj rimedoj ni devas krei tian spiritan atmosferon, kiu distingas enviinde la Esperantistaron, havanta propran kulturbazon. *Esperanto* kaj *ĝia movado nur tiam povos venki, kiam ĝiaj internaj fortoj signifas konsiderindan avantaĝon por la mondo.* Hodiaŭ pro neorganiziteco, pro ne celkonscia kaj sistema edukado kaj pro sensistema agado de la Esperantistaro nia movado *ŝajnas* bagatela, ne *multsignifa por tiu ĉi mondo. Ni rigardu kuraĝe el la vizaĝo de la reala vivo kaj ni klopodu efektivigi ĉiun premison, kiu faros nian movadon absolute necesa realaĵo de la vivo.* Nur du vojoj ekzistas antaŭ la Esperantistaro: *reorganizado kun maksimuma interna plifortiĝo*

© Biblioteca Nacional de España

aŭ *plua stagnado, kondukanta la tutan movadon al plena sensignifiĝo kaj per tio al perfekta fiasko de la lingvo mem.*

Per la enkonduko de la parlamentaj kongresoj ni faros nian laboron pli serioza, pli racia kaj multe pli fruktodona, sed samtempe ni forigas la allogan ĉarmon de la Kongresoj. Estus grava eraro senigi la Esperantistaron de tiuj tagoj, kiam la diversnacianoj renkontas sin, babiladas, kontentigas sian amuzemon kaj travivas okazaĵojn en Esperantujo. Tial estas necese enkonduki novan aranĝaĵon. Mi proponas, ke oni organizu ĉiusomere *Internacian Semajnon Esperantistan* kaj oni zorgu, ke tiu ĉi semajno havu veran esperantistan atmosferon. Dum tiu ĉi semajno okazu la diversaj fakkunsidoj de fakorganizaĵoj kaj la demonstracioj pri nia kulturo: Seminario, Internaciaj Floraj Ludoj, Koncertoj, Teatra Prezentado, Kostumbalo, Somera Universitato, Ekzamenoj de la Esp. Akademio kaj fine Ekskursoj. Oni povas konservi por tiu ĉiujara festo la tradician nomon de «*Universala Kongreso de Esp.*», sed ties fakkunsidoj ne havos kaj ne havu oficialan signifon por la programo kaj laborkampo de I. C. K. Cetere la aranĝanta nacia societo donos fiksitan procenton el la profito por la Centra Kaso de la Movado.

En la solena malfermo de la Internacia Semajno Esperantista povos fari sian tradician paroladon la prezidanto de I. C. K., povos fari salutparoladojn la reprezentantoj de la landaj societoj kaj de la *naciaj minoritatoj* kaj por kroni la solenan malfermon oni povas lokigi kiel finan programpunkton la kulturokazaĵon de la Internaciaj Floraj Ludoj, dum kiu la laŭrita poeto kondukos sian elektitan Reĝinon kun ŝiaj korteganinoj sur la estradon. (Oni povas aranĝi plikonvene tiun ĉi solenaĵon en la kadro de la Internacia Kostumbalo.)

Per tia aparta aranĝo ni ne malhelpas la laboron de la parlamenta kongreso (nur en ĉiu tria jaro okazantan), kies membroj povas esti nur elektitaj deputitoj, sed ni ankaŭ ne forprenas la okazon de tiuj aferoj, kiuj havas allogan signifon por la esperantistoj, vizitantaj la kongreson ne pro la oficialaj kunsidoj.

*Kiel transiri al la reorganizado?* I. C. K. en konsento kun K. R. decidas pri la enkonduko de la balotlegitimiloj, zorgas pri ilia vendado en ĉiu nacia societo, grupo, faka organizaĵo kaj tiamaniere preparinte la elektadon de la deputitoj fiksas dusemajnan tempon por la balotado mem.

© Biblioteca Nacional de España

